



Kjære lesar,

I dette nummeret kan du lesa om fem sterke inntrykk frå feltarbeidet mitt i India, dette store, viktige og spanande landet, i fjor vår. Dersom du har lyst til å reisa ut sjølv må du sjekka siste nytt om overnattingstenesta Pasporta Servo heilt sist.

Helsing
Leif Arne Storset,
redaktør



inter ni dirite

- LA JUNULARA FORUMO

Redaktis: Leif Arne Storset – Enpaĝigis: jpa

Kvin impresoj de Barato

Dum du monatoj pasintjare mia hejmo estis New Delhi, Barato. Inter ordo kaj ĥaoso troviĝas Delhi, kun 12 milionoj da homoj kaj preskaŭ same multe da vivmanieroj. Tie mi studis problemojn pri komputil-programoj en la sansistemo...kaj ankaŭ studis kulturon kun kvarmiljaraĝa historio.

Kiam mi alvenis, mi sopiris produktojn kiel Tine Glacikafon kaj pensis pri la ŝtormo Tuva, kiu tiam atakis Norvegion. Dum mia tempo tie mi miris pri multaj aferoj, ekzemple McDonald's sen ruĝa viando. Post kiam mi revenis al Norvegio, mi sopiras la ekscitan trafikon, la delikatan karemanĝon, la belajn konstruaĵojn kaj la 23 por mi novajn lingvojn. Jen kelkaj impresoj de mia tempo tie.

1. ĈAJBUDO

Ĉiun tagon kiam mia amiko Bharath invitis min por aĉeti *masala ĉaj* – spican tetrinkaĵon kun multe da lakto kaj sukero – mi ektremis pro atendado kaj rapide prenis miajn ŝuojn. La budo staris apud larĝa, bruega strato kun centoj da aŭtoj ĉiuminute. La *ĉajŭala* (teisto) prenis tason de la polvoplena tablo kaj verŝis iom de la dieca trinko por mi. Kiel kutime, ĝia gusto sentiĝis kiel Barato mem: spica, dolĉa, stranga, fiera. Kaj kiel kutime, la reago de mia stomako memorigis min ke amo de Barato postulas certajn oferojn.

2. SLUMO

Antaŭhieraaŭ mi spektis *Slumdog Millionaire* kaj memoris la vizitojn al la slumoj de Delhi. Kiam mi kuraĝis



Ordforklaringar

Barato - India
 ĥaoso - kaos
 sano - helse
 fundo - bakgrunn
 glacikafo – iskafe
 karemanĝo – karrimat
 polvo – stov
 verŝi - helle
 almozulo - tiggjar
 nupto - bryllup
 dolĉaĵoj - søtsaker
 kaprino – geit
 kriketo - cricket
 bazpilkado - baseball



promeni inter la danĝeraj konstruaĵoj kun tro da homoj, mi malkovris la buntecon de la komerca kaj popola vivo tie. Kaj, iom surprize, sufiĉe kontentajn plenkreskulojn kaj geknabojn kaj malmulte de almozuloj.

3. NUPTO

En marto mi estis invitita al geedziĝo en urbo apud Delhi. Mi ne konis la familion, sed tio ankaŭ validis por multaj el la aliaj 1000 gastoj. Por baratanoj edzeco estas eĉ pli grava ol por ni, kaj la grandeco kaj ekstravaganco de nuptoj vere montras tion. Kontraŭ la situacio por virinoj en Barato ĝenerale, dum la nupto la fianĉino estas kiel diino, kun luksegaj vestaĵoj kaj abunda respekto. La festo daŭras de tagmezo ĝis mateno, la ceremonioj dum tri tagoj. Estis nekredeblaj



kvantoj da manĝo ofertata de ĉirkaŭ kvindek kuiristoj kaj kelneroj. Mia plej ŝatata estis la spicaj konfitaĵoj boligitaj el kaprina lakto dum la festo.

4. KRIKETO

Post labora tago ni iris el la oficejo por ludi kriketon en la *majdana*, la ludkampo apud la domo. La aliaj ludantoj ĝojis pri la venko kontraŭ Aŭstralio, kaj mi konfuziĝis pri la reguloj. Feliĉe, mi lernis *Quidditch* (la komplikegan ludon de Hari Poter) kaj bazpilkadon (usonan pilkludon) antaŭe, kaj tio preparis min por la ampleksa regularo. Bonŝance nia ludoj ne daŭris multajn horojn kaj 200 poentojn kiel en la profesiaj ligoj. Ni nur ludis por eviti la oficejajn ekranojn kaj seĝojn kaj renkonti niajn najbarojn.

5. VILAĜO LAŬ KANALO

Dum semajno mi vizitis la sudan ŝtaton Kerala kune kun alia esperantisto, kaj vojaĝis sur kanaloj en *ketuvalam*, domboato, dum du tagoj. Laŭ la kanaloj estis mirinda kolekto de vilaĝoj. Ĉiam ni vidis apud la kanaloj kiel pendis sekiĝantaj vestaĵoj, kuris kaj padelis geknaboj al la lernejo, kaj komercis la popolo.

La akvo estis por ili kiel vojoj estas por ni, sed ankaŭ lavejo kaj ludejo. Estis strange vidi la vivojn de stranguloj tiom proksime: sentis kiel mi spektis tra iliaj kuir-ejfenestroj.



Pasporta servo 2.0 – no på nettet!

Om du tykkjer at *Pasporta servo* er frykteleg gamaldags som berre kjem på papir og ikkje finst på nettet, då er TEJO samd med deg! TEJO er andsvarleg for tenesta som gjev deg gratis overnatting hjå esperantofolk over heile verda for kr. 180 i året. Joop Kiefte («LaPingvino» på Twitter) leier arbeidet med å laga ei nettutgåve av den tradisjonsrike tenesta, som byrja i 1966 og som no har 1320 vertar i 92 land.



Joop Kiefte

– Når vi no oppretter ein slik nettstad med tilhøyrande database, vert tenesta mykje meir

brukarvenleg for ungdom i dag, forklærer Joop.

– Vertane kan lettare oppdatere opplysningane sine og gjestane kan raskare finna ut kvar dei kan få overnatting. At det heile er mindre arbeid å styra for oss, er ein fin bonus.

Den oppdaterte tenesta skal vera klår til bruk i mai. Følg utviklinga på Twitter på <http://twitter.com/pasportaservo/>

Venonta IND

La venonta *Inter ni dirite* havas limdaton la 15an de majo. Sendu vian kontribuajon al: nje@esperanto.no

PONDUS



© Øverli. distr. strandoverli@yahoo.com

— FINO DE *INTER NI DIRITE* —